KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 40-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2016 N-ro 163

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero.*

# EKZEMPLO DE AMO, FIDO KAJ KARITATO

Ekster karitato nenia savo” estas la maksimo de Spiritismo. Ĝi spegulas parton de la instruoj de la Majstro Jesuo, kiu nin konsilis: “Amu vian proksimulon kiel vin mem” (Mateo, 22:39). Tiuj vortoj estas konataj de multaj homoj, almenaŭ teorie, laŭ la evolustato de nia planedo, ankoraŭ konsistanta en mondo por provoj kaj kulpelaĉetoj.

Tamen, prilumataj mensoj elvidigas al ni, ke eblas praktiki tiujn instruojn kaj en ĉi-eldono ni volas reliefigi la agojn de unu el tiuj entreprenemaj spiritoj, kiu nelacigeble kaj kristanece laboras en la praktikado de amo, fido kaj karitato: la mediumo, oratoro kaj verkisto Divaldo Pereira Franco (Ĝivaŭdo Perejra Franko).


Divaldo naskiĝis en Feira de Santana, urbo el la subŝtato Bahio, nordoriento de Brazilo kaj nun havas 89 jarojn. Kune kun Nilson de Souza Pereira (Onklo Nilson) li fondis, en 1952, en la ĉefurbo Salvadoro, la Loĝejon de la Vojo, spiritisma institucio, kiu, interalie, edukadas milojn da infanoj, prizorgas ilian sanon kaj de iliaj familioj kaj donas laboron al centoj da personoj.

La Loĝejo de la Vojo kalkulas je granda teamo da kunlaborantoj, konsistantaj el ĉirkaŭ 400 volontuloj, kiuj kunlaboras en socia asistado al pli ol 5000 personoj, ĝenerale malriĉuloj. Ĉiun tagon, infanoj ricevas adekvatan nutradon kaj lecionojn en oficialaj lernejoj; plenkreskuloj estas konsultataj de kuracistoj kaj cetere ricevas senpage eblon submetiĝi al diversaj laboratoriaj ekzamenoj kaj aliron al aliaj servoj.

La Loĝejo de la Vojo estas subtenata de volontulaj kontribuoj kaj kontraktoj kun ŝtataj instancoj je tri niveloj, tio estas, kun la urbodomo de la ĉefurbo Salvadoro, kun la subŝtato Bahio kaj kun la federacia instanto de Brazilo. Cetere, ĝi ricevadas apogon de la ĉirkaŭanta komunumo.

Divaldo Pereira Franco ĝis nun publikigis 260 librojn, kies aŭtorrajtoj estas destinataj ne nur por la subtenado de la Loĝejo de la Vojo, sed ankaŭ al diversaj aliaj filantropaj institucioj.

Ke la ekzemplo de tiu senkompara kristanlaboranto prilumu kaj kuraĝigu pli da homoj labori sur la kampo de la bonfarado, konforme al la instruoj de la konsolanta Doktrino de la Spiritoj kaj ĉefe al la faroj de Jesuo-Kristo, kiam estis ĉe ni!



La mediumo, oratoro kaj verkisto Divaldo Pereira Franco

Infanoj prizorgataj de la Loĝejo de la Vojo kune kun Divaldo Pereira Franco

Maljunuloj tagmanĝas en la Loĝejo de la Vojo

# AMIKOJ DE LORENZ



Suely Alves Lopes

Ĉi-eldone Komunikoj omaĝas la senlacan samideaninon kaj konstantan kunlaborantinon de nia Eldonejo: SUELY ALVES LOPES, bofratino de DÉLIO PEREIRA DE SOUZA, fondinto de Eldonejo Lorenz.

Koran dankon, SUELY!



La junaj Délio kaj Suely
(11 jaraĝa)

# REDAKCI-ARTIKOLO

Karaj gelegantoj,

Unu fojon pli ni kontaktas vin, kunportantaj diversajn informojn kaj kunĝuantaj la idealon de paco, frateco kaj laboro sur la kampo de la bono.

Eldonejo Lorenz, elplenumante la idealon dissemi fruktodonajn ideojn kaj verkojn. Ĉi-eldone Komunikoj omaĝas al la reliefigo de homoj kaj ties agoj, akorde kun la idealo de Esperanto kaj ankaŭ kun tiu de konstruado de iu socio pli justa kaj frata.

La ĉefartikolo prezentas la grandiozecon de la mult-facetaj laboroj de la mediumo Divaldo Pereira Franco, el la brazila subŝtato Bahio. Estas menciataj kelkaj kunlaborantoj kaj amikoj de Eldonejo Lorenz kaj elstariĝas la publikigo de la impona verko de la posteŭlo de Allan Kardec, la franco Léon Denis, 'Post la morto', kies legado nepre konsilindas.

Meze de tiuj temoj estas ankaŭ prezentataj informoj, kuriozaĵoj kaj instruoj, surbaze de la sperto de personoj, kiuj kundividas kun ni tiujn samajn interesojn.

Bonan legadon kun espero je tio, ke vi plej multe profitos ĉi tiun informilon!

## NE LACIĜU AMI

Eble la respondo de la amo ne venos tuj. Kredeble vi surpriziĝos pri la reagoj, kiujn ĝi favoras.

Eble kelkaj el ili estas malkuraĝigaj.

Okazas ke, nekutimiĝintaj al la puraj sentoj, la personoj reagas per mekanismoj de memdefendo.

Tamen, insistante, vi sukcesos elmontri la gravecon de tiu senlima sento, kaj vi imitos tiujn, kiujn vi amas, ricevante returne la benon, kiu envolvas ĝin.

Amu do ĉiam.

Spirito: Joanna de Ângelis
Mediumo: Divaldo Pereira Franco


LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 40-a – n-ro 163 | Julio-Aŭgusto-Septembro 2016

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: + **55-21-2221-2269** - + **55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**
Retpaĝo: **http://editoralorenz.blogspot.com.br**





Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al s-ro T. P. en Rosburgo, 1889

Se ni volus presadi la gazeton en tri lingvoj, ĝi estus por la plejmulto de la abonantoj perdita kosto. Eĉ la tradukon germanan ni donas ne pro oportuneco, sed pro kelkaj aliaj kaŭzoj, pri kiuj ni tie ĉi ne povas paroli. En unu tre granda lando oni ne enlasus nian gazeton sen traduko. Rigardu ankaŭ la respondon al s-ro J. R. en svedujo.

Zamenhof

Al Majnov, 1889

Estimata amiko!

Mi dankas vin kore por via lasta letero kaj por la esperoj esprimitaj en ĝi. Se ĝi prosperos al vi ebligi al mi la eldonadon de gazeto, tiam ĝi estos tre grava por nia afero, ĉar mi tiam havos la eblon regule labori por ĝi. Kune kun tiu ĉi letereto, mi aldonas al vi alian leteron, skribitan ruse, kiun vi povas montri al la granda princo. La letero estas skribita kiel letero privata al vi. Pri la granda princo mi skribis ''nekonata de mi persone", - ĉar estos multe pli bone, se la princo ne scios ke vi jam skribis al mi pri li; al la princo vi devas diri, ke mi ne scias ankaraŭ kiu estas la persono de kiu vi atendas helpon; ke vi skribis al mi nur ke de "unu granda persono" vi atendas helpon (li povus koleri se li sciiĝus, ke vi enmiksas lian nomon ankoraŭ antaŭ ol li efektive promesis sian helpon).

Kun senpacienco mi atendas jam la rezultaton de via penado.

L. L. Zamenhof

**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

***COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

## LORENZ EN LA UK

Fido kaj Scienco estis la temo de la prelego de Lorenz en la Universala Kongreso de Esperanto en Nitra, Solovakio. João Silva dos Santos kaj Elmir dos Santos Lima disvolvis la temon al pli ol 30 gesamideanoj. Ankaŭ nia teamo partoprenis la Movadan Foiron, kie ni disdonis, senpage, librojn kaj mesaĝojn pri Spiritismo.

Kiel tradicie ĉiujare okazas, nia Eldonejo lanĉis Almanakon Lorenz kaj ankaŭ la libron "Post la Morto", de la franca filozofo Leon Denis. Se vi, ekster brazilaj samideanoj volos ricevis la du verkojn, tute senpage, sciigu al ni vian kompletan nomon kaj poŝtadreson: editora_lorenz@uol.com.br





Lorenzanoj kaj geamikoj en la Movada Foiro



De maldektre João kaj Elmir, Sidanta Teresinha

Kun granda ĝojo, Eldonejo Lorenz ĵus lanĉis, en Esperanto, tre signifan verkon de la franca filozofo Léon Denis, “Post la Morto”. Ĉi-libro estis lanĉita en la fino de la jaro 1890 kaj renkontis grandan sukceson ĉe la legantaro, spiritista kaj ne spiritista, en Francio. Ĝi prezentas brilan, fekundan resumon de la Spiritisma Revelacio. Denis, kiu jam laboradis super tiaspeca verko, ricevis fortan instigon de la Internacia Spiritualisma Kongreso, okazinta en 1889, kies anoj aprobis mocion kun propono pri publikigo de resumo de la Spiritisma Filozofio en popola eldono.




Reliefigas, inter multaj, jen komento aperinta en la franca periodaĵo *Le Temps*:

“Temas pri vera rimarkinda verko, posedanta ĉiujn kvalitojn, kiuj povas certigi al ĝi sukceson. Kvankam eminente klasika, profunda kaj serioza, ĝiaj paĝoj radias grandan lumon kaj estas sorbigitaj de la arda elokventeco. Kiel montras la titolo, la verko pritraktas la grandiozan problemon pri la homa destino kaj solvas tiun ĉi demandon, ĉiam polemikan tra la jarcentoj, nome: la kialo de l’ vivo. Efektive dorna problemo, sed pritraktita per tiom da kvalitoj stilaj kaj elokuciaj, ke en la tuta libro ne troviĝas eĉ unu sola paĝo, kies legado estus teda aŭ seninteresa”.


“Post la Morto” havas 308 paĝojn. Se vi, samideanoj ekster Brazilo, volos ĝin ricevi, tute senpage, skribu kaj ni ĝin sendos al vi; inkluzive, se vi volos per la eletronika formato, ankaŭ ni ĝin sendos al vi. Skribu al **editora_lorenz@uol.com.br**.

LÉON DENIS naskiĝis en la franca urbo Foug, jurisdikcio de Toul, la 1-an de Januaro 1846, kaj forpasis en Tours, la 12-an de Aprilo 1927, en la aĝo de 81 jaroj.

Li estis samtempulo de Allan Kardec, la Kodiginto de Spiritismo, kies verkaron li komencis studi jam en sia junaĝo.

Pro la graveco de siaj libroj kaj la alta moraleco de sia vivo, ĉiam dediĉita al la studado kaj disvastigado de la Doktrino de la Spiritoj, Léon Denis estas nomata Apostolo de Spiritismo.

Dotita per brila talento kaj neordinara kapablo profunde esplori ĉiujn fenomenojn de la naturo, li povis krei verkon imponan pro la riĉeco de gravaj informoj sciencaj, filozofiaj, historiaj kaj precipe moralaj. Super la mirindaj paĝoj ŝvebas la dolĉa, diafama lumo de entuziasmo kaj raviteco, naskita de lia senmezura amo al la Naturo, al la vivo kaj al ĉio lin ĉirkaŭanta. Ĉiuj liaj verkoj, eĉ tiuj, en kiuj estas pritraktitaj la plej altpensaj kaj subtilaj temoj, estas aŭtentaj poemoj en prozo, dank’ al la poezia lingvaĵo, kiu vestas liajn ideojn.





"Super la problemoj pri la vivo kaj la destino staras la demando pri Dio.

Se ni studas la leĝojn de la Naturo, se ni esploras la idealan belecon, el kiu inspiriĝas ĉiuj artoj, ni nepre ĉie kaj ĉiam, super ĉio kaj en la fundo de ĉio trovas la ideon pri unu supera Estaĵo, necesa kaj perfekta, eterna fonto de l'Bono, de l'Belo kaj de l'Vero, en kiu identiĝas la Leĝo, la Justeco kaj la superega Racio."

(DENIS, Léon. **Post la morto**: elvolvo de la doktrino de la spiritoj. Rio de Janeiro: Lorenz, 2016. p. 93)

# LA POLIGLOTA ESPERANTISTO

**Alberto Flores**



Kiam mi estis studento pri inĝenierarto en Porto Alegre – RS (ĉirkaŭ la jaro 1950) mi ekpartoprenis en la semajnaj kunsidoj de ESPA (Esperantista Societo de Porto Alegre).

Iu tago aperis en nia kunsido nekonata sinjoro, tre simpatia kaj afabla, kiu salutis nin en Esperanto: "Bonan vesperon, estimataj samideanoj. Mi estas Wanderley Francisco Gonçalves, profesoro pri la angla lingvo ĉe la militista lernejo de Porto Alegre. Saluton! Mi petas permeson partopreni en via kunsido."

Kia agrabla surprizo! Tiu sinjoro parolis en perfekta Esperanto! Li estis tute nekonata de mi. Estis la unua fojo, kiu ni vidis lin. Do, kun plezuro, ni invitis lin sidiĝi inter ni kaj, kurioze, ni demandis lin kie li lernis Esperanton.

"Mi estas memlernanto de Esperanto kaj de aliaj lingvoj. Mi tre interesiĝas pri lingvoj. Mi jam konas kelkajn! Mi uzas la "Lingvafonajn Metodojn" (konversacia metodo per diskoj)". Dum la interparolado ni malkovris ke li estas kolonelo de la brazila armeo. Li rakontis ke li konas ĉiujn latinidajn lingvojn (portugala, hispana, itala, franca, rumana) kaj ankaŭ la lingvojn rusa, angla, germana, japana, ĉina... kaj aliaj, kiujn li nur legas, sed ne parolas.

Li diris ke li sufiĉe bone konas la fundamentojn de la lingvoj latina kaj greka. Do, la ĵus alveninto estis vera poligloto kaj li eĉ estis amiko de Francisco Valdomiro Lorenz, alia fama poligloto. Poste li multe helpis la anojn de ESPA plibonigi sian konon pri Esperanto. Li estis kompetenta profesoro kaj klera lingvisto!

# MIAJ TRAVIVAĴOJ PERE DE ESPERANTO

*Rinaldo Galindo*



Mi, Rinaldo Galindo, kune kun la brazila sinjorino Tânia Paixão, vojaĝis al Roma kaj tie ni renkontiĝis kun la samideanoj Lucia Beraldo Veronica, kaj Luiz Fernando Puhl. De la flughaveno Leonardo da Vince ni vojaĝis al Praga, ĉefurbo de Ĉeha Respubliko, kie tie aliaj tri geesperantistoj grupiĝis al ni: Arnaldo Rebalato, Sergio Neri kaj Rosilda T. Morais, ĉiuj el la brazila ĉefurbo Brazilja. Ni ĉiuj gastiĝis du tagojn en tiu bela urbo kaj konis ĝiajn belajn kastelojn, muzeojn, antikvajn pontojn. Per trajno ni vojaĝis al Viena kaj tie ni restis ankaŭ du tagojn, konis la precipajn turismajn punktojn, inkluzive la Muzeon Esperanto, la tutan tempon ĉiĉeronitaj de la esperantisto Franziska Dodik. La 23-an de Julio ni vojaĝis al Nitra, Slovakio, kie okazis la 101-a UK, kune kun 1252 partoprenantoj el 59 landoj! Kia mirindaĵo! Kia bela universala kunfratiĝo nome de nia amata Esperanto! Nur povas taksi aŭ senti tion, tiu, kiu partoprenas, ĉar per simplaj vortoj ne eblas preskribi la etoson de amo kaj ĝojo kiam ni konas unuafoje personojn el diversaj landoj kaj revidas gesamideanojn kiujn ni konis en antaŭaj kongresoj, kiam okazas emociaj fulmotondroj en niaj koroj! Neforgeseblaj tagoj!

En la libera tago de la Kongreso, mi, Arnaldo Rebelato, Luiz Fernando kaj Sergio Neri decidis koni alian landon: Hungario. Tie ni vizitis la popularan merkaton en Budabeste, ĉefurbo de tiu bela lando, sed ankaŭ palacojn, muzeojn, kastelojn, pontojn, eĉ la Parlamenton kaj la riveron Danubio. Vespere ni revenis al Nitra.

Ĉe la fino de la kongreso, amaso da feliĉaj geesperantistoj, kantante, faris promeneton tra la stratoj de Nitro ĝis la ĉefa placo. Tuj poste, ni iris al la flughaveno kaj revenis al nia amata Brazilo, dankante al Dio pro ĉio! Dankon, Esperanto!

# CLÓVIS TAVARES: SPIRITISTO KAJ ESPERANTISTO

*Eurípedes Alves Barbosa*

Sebastião Clóvis Tavares estas famkonata spiritisto, kiu verkis spiritismajn librojn, prelegis pri spiritismaj temoj kaj fondis bonfarajn instituciojn.



Clóvis Tavares

Li naskiĝis em Campos (Campos dos Goytacazes), Ŝtato Rio-de-Ĵanejro, la 20-an de januaro 1915, kaj forpasis en la sama urbo, la 13-an de aprilo 1984. Clóvis diplomiĝis pri Juro ĉe la Nacia Fakultato de Juro, en Rio-de-Ĵanejro. Li fariĝis profesoro pri Juro Internacia kaj Historio.

Clóvis verkis plurajn librojn, jene: **Sementeira Cristã** (tri volumoj), **A Vida de João Baptista** (por infanoj), **Histórias que Jesus Contou** (por infanoj), **A Vida de Allan Kardec** (por infanoj), **Os Dez Mandamentos** (por infanoj), **Meu Livrinho de Orações** (por infanoj), **Trinta Anos com Chico Xavier**, **Amor e Sabedoria de Emmanuel**, **De Jesus para os que Sofrem** kaj la gravan verkon **Mediunidade dos Santos** (Mediumeco de la Sanktuloj), ĉi tiu eldonita de Brazila Spiritisma Federacio.

Li estis intima amiko de Francisco Cândido Xavier (Chico Xavier) kaj vizitis tiun mediumon plurfoje dum dekoj da jaroj. La amikeco inter ambaŭ rezultigis la verkon **"Trinta Anos com Chico Xavier"** (Tridek Jarojn kun Chico Xavier).

En la kvindekjaroj, Clóvis interŝanĝis leterojn kun Pietro Ubaldi kaj kiel kompetenta tradukisto li tradukis el la itala lingvo Esperanten la sekvantajn verkojn de tiu itala saĝulo: **As Noúres**, **Ascese Mística**, **Grandes Mensagens** kaj **Fragmento de Pensamentos e Paixão**. En 1951, Ubaldi vizitis Brazilon kaj faris plurajn konferencojn en la itala lingvo, kaj Clóvis respondecis pri la tradukado en la portugalan.

Clóvis estis poligloto ĉar li posedis la italan, la anglan, la francan, la hispanan kaj Esperanton.

Ĉu Clóvis estis vere esperantisto? Jes. Bedaŭrinde, aŭtoroj de liaj biografioj ne tuŝas la aferon Esperanto. Mi legis kelkajn biografietojn de nia kara samideno kaj ili ne informas, ke Clóvis estis esperantisto. Estas necese diri, ke estas pruvoj pri la agado de Clóvis en la kampo de Esperanto.

En la "Analoj de la 15-a Brazila Kongreso de Esperanto", paĝo 308, en la **"Historio pri la Esperanta Movado en Brazilo"** (kunordigita de Osvaldo Pires de Holanda) kaj en la revuo **"O Brasil Esperantista"**, eldono de majo/junio 1940, oni trovas klarigojn pri la fondo, en la urbo Campos, de Sociedade Luz Esperantista e Concórdia (Societo Esperantista Lumo kaj Konkordo) kaj de Grupo Esperantista Terceiro Milênio (Grupo Esperantista Tria Jarmilo), kun la aktiva partopreno de Clóvis Tavares.

Legu la noton aperintan en la menciita numero de **O Brasil Esperantista**:

"Fondiĝis Societo Lumo kaj Konkordo, kies sidejo estas: Rua Formosa, 218, Campos-RJ. Malfermiĝis kurso de Esperanto, direktata de d-ro Clóvis Tavares. Fondiĝis ankaŭ "Grupo Esperantista Tria Jarmilo, kies instruisto estas la sama de la alia grupo. Jen ĝia adreso: Rua Carlos de Lacerda, 151".

En la 13-a de julio 2016, d-ro Flávio Mussa Tavares, filo de Clóvis, skribis al mi dirante, ke lia patro parolis kaj skribis Esperante kaj plurfoje gvidis kursojn de la lingvo ĉe Escola Jesus Cristo (Lernejo Jesuo Kristo).

Ne restas duboj. Sebastião Clóvis Tavares - klera, agema kaj bonkora homo - krom spiritisto estis ankaŭ esperantisto.





## SENPAGAJ LIBROJ...

**Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi al ni vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al <editora_lorenz@uol.com.br>**

LORENZ